GISTO, FEB-2005.
G.O.VASKE
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-Rs

ttt-kongrua skribo.
Legajxo disdonata dum la Verda Kafo-(POA)

VIRINOJ DENOVE ATAKAS.- (El DG, esperantigis GOVaske)

La ino x vira batalo dauras, kiel kutimas okazi en la homa vivo.

1) – Edzo similas al menstruo; alveninta, perturbas.

2) – Viro estas tiomgrade dependa ke, por farigxi kiel li devos chiam esti, li bezonas la helpon de virino.

3) – Virino daure solidaras kun sia viro. Viro restadas chiam che la ino kiu al li plej plachas kaj “oron” donacas.

4) – Chiu viro revas seksumi kun du inoj samtempe. La ideo bonvenas, almenau restas veka homo kun kiu konversacii, dum la laca endormigxis.

5) – Por edzoj, edzino de amiko samas al altega muro.Komence ili timas, post kelktagaj rilatoj ili kuragxas “grimpi” – Viroj, arigxu por respondi el nia fortreso!

KONTRASTE.

Far L.Selbach – rebakita k esperantigita de Vaske.

Ni chiuj, naskigxintaj en la kvardekaj jaroj, pratempas de antau ol ekzistis TV, penicilino, Sabin-vakcino, fridigita mangxajxo...antau ol ekzistis radar-ekipoj, kreditkartoj, atoma fuzio, laser-radioj, globskribiloj, mangxilara lavmasxino, vestosekigilo, elektra litkovrilo, klimatizilo kaj antau ol viro pasxis sur la luno. Ni nunaj grizuloj unue edzigxis por nur poste logxi kune...ba...strangaj homoj!

Ni naskigxis antau ol ekzistis la gej-rajtoj, antau ol virino laboris ene kaj ekster la hejmo, antau ol la gefiloj vivis sendependece, antau ol ekzistis infanvartejoj, grupa terapio kaj la resanigejoj nomataj SPA, superluksaj apartamentoj moderne nomataj FLATs, RESORTs, antau ol la nacilingva poluo indis kondamnon. Neniam ni estis audintaj pri sonbendoj, KD, DVD, elektraj tajpiloj, artefarita koro, surekranaj ludoj, komputiloj, diference spicita johurto...viroj kun orelringoj...

Niatage oni fumadis cigaredojn. Herbo estis por infuzi teon...Koka estis refresxigajxo kaj polvo estis malpurajxo...ninado indormigis infanojn...bastonbato estis puno. Dentpuriga fadeneto neniel estis ina vestajxo. Masxigado estis laboro de teksisto. Ni kontentis je tio kion oni posedis. Ni estis la lasta generacio sufiche stulta por pensi ke, por mendi bebon necesas viro. Ne timigas nin, ke tiome ni konfuzigxas kaj ke restas tiel vasta abismo inter la generacioj...sed, malgrau chio ni vivadis kaj daure vivos, malgrau la venonta inventajxo!

40ª BKE.

Karaj, restas kvin monatoj por ke chiuj gauchoj farigxos kapablaj paroli en Esperanto, ne lau brazilanaj dirmanieroj sed jes lau la internacia kulturo. Ne okazu ke vi invitas vizitanton akompani grupon al difinita ejo kaj, pro la enradikigxinta kutimo paroli portugale, vi demandas la amik(in)on: “Chu vi ankau iras au chu vi fikas?” – hi...hi...hi. – Kaj, verki unupagxan tekston, pri banala afero, sen enlasi pli ol tri erarojn, chu vi kapablas?. Do, gratulon! Se ne, vi sxuldas pli da atento dum la paroligaj kursoj, sxuldas daure frekventi la Kunsidojn de VERDA KAFO !!- ...LKK silentemas. Radiokolegoj petas sciigojn pri la 40ª!

Enmetinda ERO POR LA 40ª BKE

Rekomendo de UEA, lau la Praga Deklaracio: ke oni provu enretigi ne-esperantistojn en niajn eventojn. Kiumaniere? – Igi ilin pagi aligxon, ne eblas.

Jen mia ideo: la ejo kie dum la Kongreso okazos distra programo kutime havas pli ol suficxajn sidlokojn por gekongresanoj tial oni invitu kulture altnivelajn personojn, por cxeesti unu senpagan spektaklon, homojn kiel instruistojn, profesorojn, studentojn, ktp. – Kiel kribri la invititan personojn? LKK anoncu en ZH/CP ke interesatoj prenu invitilojn en difinita adreso, kie oni petu montri atestilon, gxis la nombro kiun la LKK-estraro decidos enlasi.Chi procedo celas ne enlasi amason da homoj tute ne kapablaj bonkonduti kaj, chefe, ne kapablas evalui la parolatan lingvon. – Karaj movadanoj, chu vi scias bildigi al vi ion pli konvinkigan pri la glata, bonfunkciado de Esperanto ol la kolektiva reago de la verda publiko tuj tuj post kiam la sursceneja prezentanto, ekzemple, finfaris sxercon, rakontis anekdoton au kiam chiuj kune obeas sugeston, ordonon, ktp.?

AVANTAGXOJ de VIRO: (DG,29/1)

1 – Lude malfermas botelojn kaj ladojn.
2 – Dum kontrolo pri temo en TV-kanaloj, ne sentas neceson resti tie kie ino ploras.
3 – La orgasmoj chiam estas ververaj.
4 – Iras al necesejo sen la bezono teni honorgardon che si.
5 – Se nia laboro ricevas kritikon, ni ne opinias ke la tuta kolektivo abomenas nin.
6 – Antau ol urini ne bezonas purigi la necesejon.
7 – Multe seksumi ne estigas klacxojn pri nia reputacio.
8 – Ne necesas razi nin sub la kola nivelo.
9 – Neniu el niaj laborkolegoj sukcesas plorigi nin.
10 – Se ni jam 34-jaragxas, ne estas motivo de klachado.
11 – Uzas brakhorlogxon, ne biologan.
12 – Chokolado estas simpla nutrajxo.
13 – Rajtas libere pensi pri sekso dum 95% de nia veka tempo.

RECEPTO

Ellerni intensive kaj rapide au...lau la paciencoelcherpa maniero: se ne en kvarmonato, do en la venonta viv!!!.